

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1385 (12) | decembro 2023

La arkivo de Universala Esperanto-Asocio en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko | 243

109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Kiom tempo gravas? | 248

Kuniĝu ĉe Taso da Teo – komenciĝis nova turneo de Teo, Amo kaj la Mondo | 250

Serio: Pri katedro sed ne el katedro. Kio bolas en la Amsterdama kaldrono | 252



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon, la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ševĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek
Kovrilpaĝa foto: So Jinsu

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org
Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Generala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):
1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.
Anoncoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas minimume €20,00). Menu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:
Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
tel.: +31-10-436-1044
uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



243

La arkivo de Universala Esperanto-Asocio en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko

Laŭ UEA "unu el la celoj de la transdono ankaŭ estis tio, ke la materialo fariĝu pli strukture kaj profesie disponigata al esploristoj".



248

109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Kiom tempo gravas?

Mia nuna celo estas transdoni faktojn kaj spertojn kaj montri al neafrikanoj, ke bona disvolviĝo de UK en Afriko eblas.



250

Kuniĝu ĉe Taso da Teo – komenciĝis nova turneo de Teo, Amo kaj la Mondo

Teo, verda trinkaĵo, plus Esperanto, verda lingvo, fariĝis kerno de la projekto Teo, Amo kaj la Mondo en Hangzhou en 2019 sub aŭspicio de Te-amanta Esperantista Organizo (TEO).



252

Serio: Pri katedro sed ne el katedro. Kio bolas en la Amsterdama kaldrono

Ĉi tiu artikolo celas doni superrigardon pri la lastatemaj evoluoj de la katedro en Amsterdamo kaj aliaj agadoj rande al ĝi.

UEA | 245

Kion opinias membroj de UEA pri la Asocio?

Landa agado | UEA | 247

Agado en Ĉinio

Universala Kongreso | 249

Bonvenon al la 109-a UK, la kanto

Oficiala Informilo

Letero de leganto | 254

Opinio

Varsovio, Roterdamo, Herzberg kaj tiel plu!

Kotiztabelo de UEA por 2024 | 255

Evento | 256

81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sevilo 12-15.10.2023

81-a Hispana Antaŭkongreso de Esperanto en Sevilo 10-11.10.2023

Zamenhof-festoj 2023 en Eventa Servo: sciigu la mondon pri via evento

Fake, Science kaj Profesie tra la mondo | 258

Spaca Universala Kongreso kaj IKU en UEA-viva kaj la VK

Laste Aperis | 259

Belartaj Konkursoj | 260

Aperis Belarta Rikolto 2023

Edukado

Helpu pligrandigi la Esperanto-familion en du aziaj landetoj

Forpaso | 261

Indekso-2023 | 262

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Duncan Charters (Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsau, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj, Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Perence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel (Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo)

Generala Sekretario: S-ro Aleks Kadar (Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj kun TEJO, Statuta Reformo)

197 rue de Lourmel
FR-75013 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute (Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândusei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timisoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ino Gong Xiaofeng (Universitata agado ekster Eŭropo, Rilatoj kun CED, Rilatoj kun edukado.net, Virina agado)
19-1-502, Jinyuan Yangguang, Xinjian District, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio
Poŝtel. +86 186 0791 0758
arko.gong@qq.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo (Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva (Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsseom Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Michal Matušov kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

La arkivo de Universala Esperanto-Asocio en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko

■ Bernhard Tuidler



Afiŝoj el la arkivo de Universala Esperanto-Asocio

Ekde sia fondo en la jaro 1927 la Esperantomuzeo disponas pri ampleksa biblioteko kaj enhavoriĉa kolekto de arkivoj, kiuj ekde 1990 oficiale nomiĝas “Kolekto por Planlingvoj”. Kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko ĝi plenumas ĉiajn postulojn de moderna biblioteko. La plej gravaj celoj estas laŭeble kompletigi la havaĵon per daŭra kolekto, katalogi ĝin en OPAC (Online Public Access Catalogue) kaj konservi kaj protekti la planlingvan materialon precipe kontraŭ detruo, disfalo kaj perdo. Aliaj taskoj estas disponigi la planlingvan materialon al la publiko, respondi demandojn kaj esplori respektive publikigi dokumentojn ĉefe en la interreto. Tiuj celoj atingiĝas unue per daŭra, konstanta laboro, due per diversaj, esencaj projektoj pri konservado, katalogado kaj ciferecigo.

La konservejo, kiu protektas la havaĵon de la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj, ampleksas ĉirkaŭ 180m². Ĝi estas optimume klimatizita, sekura kontraŭ ĉiaspeca detruo, kiel ekzemple per nocaj bestetoj, inundo aŭ incendio, kaj en ĝi troviĝas ĉirkaŭ: 40 000 volumoj, 40 000 faldfolioj, 25 000 gazeteltondaĵoj, 22 000 fotoj kaj fotonegativoj, 20 000 manuskriptoj

kaj aŭtografoj, 4 200 diversaj titoloj de gazetoj kaj revuoj, 3 500 muzeaj objektoj, 1 600 diversaj afiŝoj, 1 250 aŭdvidaj materialoj, 80 personaj kaj instituciaj arkivoj. Ĉiuj el tiuj dokumentoj estas mendeblaj por la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj.

La 80 arkivoj, el kiuj unu estas la arkivo de Universala Esperanto-Asocio, estas specialaj kulturaj trezoroj. Signifas grandan avantaĝon, ke la Esperantomuzeo konservas multnombrajn arkivojn de diversaj personoj kaj institucioj, ĉar ili tre bone kompletigas unu la aliajn. Se vi interesiĝas ekzemple pri la biografio kaj la verkoj de Kálmán Kalocsay (1891–1976), vi povas trovi dokumentojn pri li krom en liaj arkivaĵoj ankaŭ inter tiuj de Eugen Wüster (1898–1977), de Juan Régulo Pérez (1914–1993) kaj en la arkivo de Universala Esperanto-Asocio.

En 2021 la komitato de UEA akceptis la rekomendojn de la Estraro, komisiono pri financo kaj konsilantaj komisiitaj fakuloj, ke la arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler estu transdonotaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La UEA-arkivo estas mondskale verŝajne la plej ampleksa unuopa arkivo pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado. Ĝia abundeco ebligas profundajn kultursciencajn kaj filologiajn esplorojn pri Esperanto.

En gazetara komuniko (n-ro 1045) UEA notis, ke “la CO [Centra Oficejo] ne havis fizikajn kondiĉojn tiajn, kiajn havas profesia institucio kiel ANB [Aŭstria Nacia Biblioteko] por la konservado de tiuj materialoj, nek disponas fakulojn por ilia katalogado kaj traktado.”

Laŭ UEA “unu el la celoj de la transdono ankaŭ estis tio, ke la materialo fariĝu pli strukture kaj profesie disponigata al esploristoj, kio ne povis rutine okazi en Roterdamo pro manko de katalogo, strukturo kaj laborfortoj”.



Parto de la arkivo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo

La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu estis subskribita la 28-an de februaro 2022. La donaco estis specifita per listo, kiu estas integra parto de la kontrakto, laŭ kiu la transdono okazis sen kostoj por UEA. Tiel la donitaĵoj en la Centra Oficejo en Roterdamo estis rikoltitaj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu transprenis la kostojn de laborvojaĝoj, transportoj kaj ĉio alia rilata al la realigo de la donaco. La ekzakta kontrolado kaj zorga pakado okazis dum pluraj restadoj en Roterdamo. Per kvin transportoj entute 198 skatoloj kaj 129 skatoletoj kun arkivaĵoj, fotoj, aŭdvidaj dokumentoj, libroj, periodaĵoj kaj afiŝoj estis ekspeditaj al Vieno.

La reagoj pri la transdono de la UEA-arkivo estis ege pozitivaj, kaj de esperantistoj kaj de la ĝenerala publiko. En julio 2022 UEA kaj la Aŭstria Nacia Biblioteko publikigis gazetarajn komunikojn pri la arkivo. Tre rapide tiuj komunikoj estis transprenitaj de diversaj informkanaloj, ekzemple de “ORF” (Österreichischer Rundfunk), la aŭstria radio kaj televido. Pro la transdono de la arkivo “Österreich 1”, la plej grava aŭstria radiostacio pri kulturtemoj, eĉ demandis en la Esperantomuzeo, ĉu la bibliotekistoj povus verki tekston por radioelsendo kun la titolo “Sprachliches Hoffnungsfeld Esperanto”, “lingva esperkampo Esperanto”. Tiu elsendo konsistis el kvin partoj pri la historio kaj nuntempo de Esperanto kaj aperis en septembro 2022.

La unua transporto, kiu alvenis en Vieno la 19-an de aprilo 2022 estis la plej ampleksa kun 158 skatoloj enhavantaj pli ol 800 skatoletojn kun arkivaĵoj, kiuj apartenas al jenaj kategorioj:

“Akademio de Esperanto”
 “Hans Bakker/Afrika agado Bakker”
 “Belartaj Konkursoj”
 “Centro de Esploro kaj Dokumentado”
 “Estraro de UEA”
 “Hans Jakob/Periodo Jakob”
 “Teo Jung”
 “Komitato”
 “Korespondado”
 “Landoj/Landaj Asocioj”
 “Ivo Lapenna”
 “Instancoj, organizaĵoj, grupoj, Esperantaj kaj ne-Esperantaj”
 “Planlingvoj”
 “Apartaj dosieroj pri personoj”
 “Revuo Esperanto”
 “Ŝlosiloj”
 “TEJO/TJO/IJK”
 “Aliaj pri UEA aŭ IEL”
 “Universala Kongreso”
 “Unuiĝintaj Nacioj”
 “Unesko” kaj “Diversaj”

La arkivo konsistas el plej diversaj materialoj, precipe leteroj, manuskriptoj, tiposkriptoj, fotoj, afiŝoj, faldfolioj kaj aŭdvidaj dokumentoj. Ke ĝi en-

vas multajn interesajn korespondaĵojn, jam montras la inventarlisto, kiun la Esperantomuzeo ricevis de UEA. Krom dokumentoj de la estraranoj, dungitoj kaj membroj de UEA, en la arkivo troviĝas dosieroj, kiujn UEA ricevis de aliaj personoj, ekzemple de Gaston Waringhien. Pro la fakto, ke ankaŭ la postlasaĵo de Kálmán Kalocsay estas konservata kaj disponigita en la Esperantomuzeo, oni ĉi tie trovas nun preskaŭ ĉiujn ekzistantajn korespondaĵojn inter tiuj du eminentuloj.

Aldone al la ĉiutagaj taskoj la bibliotekistoj en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj tuj komencis alirebligi la valoran trezoron por la publiko, paŝon post paŝo, ĉar temas pri longdaŭra projekto. Ankoraŭ en aprilo 2022 pli ol 800 skatoletoj estis en Vieno elpakitaj, kontrolitaj kaj zorge metitaj sur bretarojn en la konservejo.


Jam en printempo 2022 komenciĝis la katalogado, ciferecigo kaj restaŭrado de dokumentoj. Ĝis oktobro 2023 estis katalogitaj pli ol 2 000 libroj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj portas same kiel la dokumentoj el la UEA-arkivo la signon V75. Pli ol 220 el tiuj libroj jam estas ciferecigitaj kaj senpage legeblaj en la interreto. Ankaŭ pli ol 500 afiŝoj el la arkivo estas ordigitaj,



Parto de la arkivo de Universala Esperanto-Asocio en Vieno

katalogitaj, plejparte ciferecigitaj kaj tute libere rigardeblaj en la katalogo Trovanto kaj en ÖNB Digital.

En printempo 2023 ankaŭ komenciĝis la anstataŭigo de la originaj skatoloj per senacidaj kartonoj. La novaj ujoj ne transdonos acidajn substancojn sur la arkivaĵojn kaj ne povos difekti ilin. La laboroj dum la venontaj du jaroj koncernos la katalogadon de libroj, periodaĵoj, afiŝoj kaj la ekordigadon de la arkivo. Poste sekvos projektoj rilate la fotojn kaj aŭdvidajn materialojn.



Vivo de Zamenhof. Edmond Privat.

Klasika biografio de Zamenhof, kun priskribo de liaj filozofiaj, lingvaj kaj movadaj ideoj kaj agadoj.

Rotterdam, UEA, 2007 (6-a eld.). 171 paĝoj, 18 cm.

Prezo ĉe UEA: 7,50 €

La danĝera lingvo.

Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins.

Nova, plene reviziita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub

Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en la cara Ruslando kaj la orienta Azio.

Rotterdam, UEA, 2016. 375+24 paĝoj, 19 cm.

Prezo ĉe UEA: 18,00 €



Kion opinias ne-membroj de UEA pri la Asocio?

■ Duncan Charters,
Prezidanto de UEA

Kiel mi komentis pri la opinioj de la membroj en la oktobra numero, en multaj aspektoj la perspektivo de ne-membroj de UEA ne rimarkinde diferencas. Tamen valoras reliefigi la opiniojn de la 146 respondintoj al nia reta enketilo por kompari la jamajn konstatojn de la membroj kun tiuj de la ne-membroj, kaj pli bone kompreni la kialojn de ne-membreco en nia Asocio. Nur 14% el la respondintoj neniam estis membroj, nesurprize ĉar ili ne aperas en niaj listoj de nunaj kaj antaŭaj membroj. Rilate strategian planadon, kies bazon helpas kunkonstrui ambaŭ versioj de la enketilo, simile al la membroj 94% de la ne-membroj kredas la kategoriojn de la 4 strategiaj kolonoj kompreneblaj kaj uzablaj (Kunlaborado, Informado, Rilatoj [eksteraj], Instruado).

Kion opinias la ne-membroj pri la graveco de UEA?

Jen laŭvorte cititaj individuaj komentoj (mi redaktas nun kaj poste nur evidentajn misojn):

“[UEA] estas centra nodo interligi esperantistojn en la tuta mondo: ĝi estas esenca institucio por rilati al monde gravaj institucioj; ĝi stabiligas la movadon; ĝi donas ne malhaveblajn servojn por la esperantistaro entute.” “UEA ludas nediskuteblan necesan rolon.” “UEA donas al mi senton de partopreno en tutmonda komunumo de homoj.” “Mi pensas ke UEA estas gravega institucio por kunigi ĉion rilate al Esperanto en la mondo.” “Kiel instruisto kaj disvastiganto de la lingvo, la membreco pliiĝas la kredindecon inter miaj lernantoj kaj homoj kun kiuj mi havas kontakton, la entuziasmo pligrandiĝas.”

Tiuj ne estas la solaj komentoj kiuj spegulas pozitivan sintenon al UEA. Kial do ne rememriĝas ne-membroj konsciantaj la valoron de la Asocio?

Jen por nia konsidero la plej ofte menciitaj faktoroj: mi aldonu ke kun danko “pro tio inviti ĉi tiajn malplaĉajn respondojn” tamen venis ankaŭ kuraĝigo: “mi deziras al la estraro kaj ĉiuj geaktivuloj multan energion por via bela kaj utila laboro”! Niajn dankojn ankaŭ al vi!

1. “Kotizprezo tro alta”

Pluraj mencias ke la ĉefa kialo estas emeritiĝo aŭ manko de regulaj enspezoj. Por eksmembroj havantaj limigitan buĝeton, prioritato povas esti alia membreco, ĉu en Landa Asocio, ĉu Faka Asocio, SAT kaj aliaj. 41% de la ne-membroj estas membroj de Landaj Asocioj, do ne mankas inter ili subteno de la organizita movado. Kelkaj menciis ke estus bone havi kunigitajn rabatmendojn por aliĝo samtempe al Landa Asocio kaj al UEA. Unu menciis ke li aliĝis per tia aranĝo, sed por renovigo la retejo de la Landa Asocio misfunkciis kaj li ne trovis la eblon sendi la membrotizojn. Estis mencioj de problemoj aliĝi per la reto (ne ĉiuj havas retaliron aŭ sperton por tio). Pluraj ne scias kiel renovigi membrecon, ĉar UEA ĝis nun ne sufiĉe faciligas tion laŭ modernaj aŭtomatigitaj metodoj. Tiun modernigon ni atendas. Estis mencio pri la fondaĵo Canuto por membriĝi esperantistojn en malriĉaj landoj aŭ kun transpagaj problemoj, sed ŝajnas ke ne ĉiuj scias pri ĝi aŭ deziras peti tiun helpon.

Malgraŭ rabatitaj kotizoj (por iuj landoj €2), tamen estis kritikoj ke UEA ne sufiĉe helpas al malriĉuloj. Estis mencio ke laŭ la nuna sistemo kie UEA intence helpas por specifaj landoj, maljuna senlaborulo en “tro luksa” lando pagas por “luksuloj” en malriĉaj landoj. Unu ne-membro solvus la problemon per senpaga aliĝo por ĉiuj, kaj ripetataj donacpetoj por tiuj kiuj kapblas (eĉ semajne, kiel pastro petas de preĝejanoj). Aŭ aŭtomataj pagoj, ĉu?

Laŭ tiu ne-membro, aliaj asocioj kiuj sekvas tiun modelon, prosperas, ĉar ĉiuj povas aliĝi laŭ siaj deziroj kaj kondiĉoj. Kontraŭe, tiuj kiuj havas altajn aliĝkostojn, ne povas same prosperi.

2. Membraj servoj

“Ne havas sencon pagi por esti membro de UEA” reprezentas plurfoje esprimitan sintenon. Pluraj el la respondintoj ne vidis ion utilan aŭ interesan por ili, aŭ apenaŭ konsciiis ke UEA estas pli ol la revuo *Esperanto* kaj organizado de la Universalaj Kongresoj. Kiel mi komentis pri la membroj, eble ni devus reliefigi tiujn servojn kaj ilian utiligon individue en la revuo. Ekzistas impreso por kelkaj ke UEA katastrofe malpliigis la servojn dum la jaroj (la Jarlibro estas la kutime citita ekzemplo, kun la Centra Oficejo kiu estas agadfokuso por malnovaj membroj), kaj ke UEA ne plu ekzistos se tio daŭros. Malgraŭ tio ke efektive UEA regule aldonadis pliajn servojn al la membraro (ekzemple Eventa Servo, UEA viva, UEA.facila, la Virtualaj Kongresoj — kies kvara ripeto tuj realiĝos, tute senpaga por la jamaj membroj kiuj aliĝas ĝis la limdato).

Pri la aliaj ĉefaj servoj, ankaŭ du trionoj de la ne-membroj deziras ke UEA daŭrigu la organizadon de la Kongresoj, kun 20% specife interesitaj pri la UK kaj 35% pri la VK, kiujn ili povus partopreni. Pri la revuo *Esperanto* kiun 10% ne vidis, malpli ol 10% kiuj ĝin konas estas tute nekontentaj, kaj 80% kontentaj, tamen la sekvanta komento reprezentas plurajn similajn: “Estas grava organo por la movado, sed lastatempe la revuo fariĝis nur raporto pri la agado de UEA, kvazaŭ propagandilo. Tio ne estas malbona, kiel ĝenerala informado, sed laŭ mi mankas artikoloj pri kulturo kaj movado ekster la agado de UEA, pri temoj koncerne la internaciajn vivon kaj kulturon. Mi pensas, ke ankaŭ specialaj kulturaj ar-

tikoloj devus aperi.” Libroservo gravas por 77% el la ne-membroj. 55% ne bezonas presitan Jarlibron, sed 30% dezirus havi ion anstataŭe se ne eblas tiun revenigi. 43% kredas ke UEA povus peti pagon por trijara Almanako.

Atentinda estas la ripetita impresio ke UEA tro atentus pri si mem kaj pri la ekstera mondo, kaj ne sufiĉe pri la individuaj bezonoj de siaj membroj. Tio inkluzivas monperdon de aliĝoj pro devigitaj vojaĝŝanĝoj, vizorifuzoj aŭ aliaj situacioj. Por pluraj ne-membroj, se UEA pli atentus la bezonojn de la membraro, ĉu en malfacilaj cirkonstancoj ĉu ĝenerale en malriĉaj landoj, ĝi plifortiĝus kaj havus pli da kredebleco por antaŭenigi la ĉefan celon, disvastigon de Esperanto kun pliampleksigo de ĝia uzado. Ne neglektante la idealismon por pli paca, interkomprenema mondo kiun la lingvo kaj movado reprezentas.

Por tiuj ne-membroj, UEA simple ne estas tiel bone organizita kiel aliaj asocioj kiel Rotario kaj ekleziaj kaj sindikataj grupoj por tion fari. “Ĉu ni estas familio?” demandis respondinto, en kiu ni vere helpas niajn gefratojn, bazo por lerni veran kunlaboradon. Ekzistu la nunaj membroservoj, sed krom la neceso de pli profunda sento de solidareco kaj frateca interhelpemo, la laboro pli orientiĝu al la informado kaj instruado kaj rilatoj kun eksteraj organizaĵoj (do disvastigo, kio fakte precize kongruas kun la kolonoj de nia strategia planado). Esprimiĝis averto ke nia informlaboro atingu la ĝeneralan publikon, ne nur laborantojn en UN kaj aliaj internaciaj organizaĵoj (tiu flanko de nia laboro tamen ne vekis grandan kritikadon).

3. Neŭtraleco

Evidente ne eblas kontentigi ĉiujn pri politiko! Por unu ne-membro, ne eblos re-aliĝo ĝis UEA fariĝos pli politike neŭtrala: “nun ĝi estas ekstremmaldekstra organizo”; alia plendis pri perceptataj kontraŭ-naciaj referencoj en paroladoj de konata UEA-membro (ĉar Zamenhof ne kritikis la strukturon de nacioj). Aliflanke, almenaŭ unu malmembriĝis pro la rifuzo de UEA kondamni pli specife invadon de unu lando al alia.

Ni jam spertis la gamon de reagoj al tiu situacio, tamen la ne-membroj

same kiel la membroj plejmulte deziris ke en niaj deklaroj ni restu ĉe nespecifaj kondamnoj de militado kaj subteno al pacaj solvoj de konfliktoj (41%), kiun konsilon ni sekvis en nia deklaro kontraŭmilita kaj porpaca kun TEJO kaj ILEI okaze de la konflikto en Mezoriento. Ni konsciu tiurilate ke kvankam 18% deziras tutan neŭtralecon, 40% estas en kategorioj de pli fortaj deklaroj, do certe silentado antaŭ militaj konfliktoj en la mondo ne estas la dezirata vojo por la plimulto de la esperantistoj, kaj forpuŝus multajn de membriĝo.

4. Kion UEA faru pli bone

Konciza resumo de la ĉefaj punktoj:

- Post tiom da jaroj kaj elspezoj, aperu la nova, modernigita retejo de UEA!
- Konsciu ke membroidtereso varias laŭ la tempo, cirkonstancoj, monrimedoj
- Preparu kaj aktivigu strategion kiu ne hezitas kiel la nuna de UEA
- Membroj havu pli da alireblo al pli da servoj, ekzemple financaj
- Uzu volontulojn, sed ne por profesiaj taskoj: malpli da amatoreco
- Lernu kiel disvastigi la lingvon per kuna agado, merkata strategio
- Trejnu por argumenti kontraŭ mensogoj pri Esperanto
- La homoj ne nur eksciu pri Esperanto, sed ankaŭ kion pri ĝi kaj per ĝi fari
- Kreu plej diversajn servojn ne nur por Esperanto sed per Esperanto
- Servoj rilatu al ĉiuj aspektoj de la Esperanta vivo, lingvo kaj kulturo
- Plifaciligu rilatojn inter membroj kiuj havas samajn interesojn
- Subtenu komunikadon en Esperantujo por esperantistoj nemembroj
- Ebligu pli aktivan engaĝiĝon per regula kontakto kun la lingvo kaj movado
- Disvastigu kaj klarigu la ideon de lingva demokratio kaj de lingvaj rajtoj
- Esploru komunajn interesojn kaj partnerecojn kun eksteraj organizaĵoj
- Kuraĝigu aliĝon al neesperantistaj asocioj por helpi ilin kaj ricevi helpon
- Kreskigu sciencajn esplorojn pri la didaktikaj avantaĝoj de Esperanto
- Iniciatu praktikajn lerneajn eksperimentojn por pli efika scienca/faka informado
- Apogu pli forte la bonajn iniciatojn de Landaj kaj Fakaj Asocioj

- Organizu reciprokan helpon inter bonvolaj homoj
- Instruu, trejnu (plej subtenata de 20%: atelieroj pri interkultura kompreniĝo)
- Kultivu fratecon inter popoloj ĉar baldaŭ la lingva baro falos tra teknologio
- Estu kreemaj pri novaj projektoj celantaj realajn rezultojn por antaŭenigi Esperanton
- Estu entreprenemaj, subtenantaj ekzemple Esperantajn kompaniojn
- Organizu interkulturan vojaĝadon (tro da prelegoj, kunsidoj, raportado)
- Nutru la sociajn retojn, inkluzive la nacilingvajn
- Faru el “eternaj komencantoj” verajn E-parolantojn por kredindeco de la komunumo
- Kunlaboru por pli paca mondo sen landlimoj, planeda konservo, diversgenra justeco

Mi finos la reprezentajn komentojn kaj proponojn per lasta pli longa rekomendo kiun ni koincide ĵus komencis diskuti: “Stimulu ĉiutage la informadon pri Esperanto en kiel eble plej multe da lingvoj, retroveblan en unu loko sur ĝia retejo (de UEA) por ke iu ajn esperantisto disponu pri informtekstoj en aliaj lingvoj por informaj celoj ekster Esperantio.”

Nia tasko nun estas kunigi la ideojn kiujn ni kolektis de antaŭaj diskutoj kun la rekomendoj de 842 membroj kaj ne-membroj, kaj krei komisionojn kaj laborgrupojn por eklabori pri la plej prioritataj taskoj de UEA en KIRI (Kunlaborado, Informado, Rilatoj [eksteraj]), kaj Instruado).

Inter la submetitaj rekomendoj, estas sufiĉe multaj kies klareco kaj utilo meritas disponigon al ni ĉiuj, do ni intencas tion aranĝi en la reta revuo de UEA kaj en nia Forumo, por ke ĉiuj havu aliron al la komentoj penseme komunikitaj por nia konsidero. Atentu anoncojn en la revuo.

La januara numero de la revuo *Esperanto* inkluzivos resumon de nia labordirekto por 2024 en la novjara mesaĝo de la Prezidanto, kaj ni tenos vin daŭre informitaj pri la evoluo kaj la dato, kiam vi povos vin proponi por komisiono aŭ laborgrupo post kiam ni kune decidus la prioritatojn por agadoj kiuj estas praktike realigeblaj.

Agado en Ĉinio



■ Gong Xiaofeng

La 20-an de oktobro Liu Dawei, vicprezidanto de Ĉina Internacia Komunikada Grupo kaj prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), renkontiĝis kun D-rino Gong Xiaofeng, estrarano de UEA. Ĉeestis ankaŭ Wang Hanping, vicedirektoro de la Azi-Pacifika Centro de Ĉina Internacia Komunikada Grupo kaj vicprezidanto de ĈEL, Nan Youli, eksprezidanto de la estraro de kon-

trolantoj de ĈEL, Chen Ji, ĝenerala sekretario de ĈEL, kaj Jiang Limin, vicĝenerala sekretario.

La prezidanto Liu Dawei gratulis Gong Xiaofeng pro ŝia elekto kiel estrarano de UEA, kaj esprimis sian dankon al UEA pro ĝia longdaŭra zorgo kaj subteno al la ĉina Esperanto-movado. Li esperis, ke ambaŭ asocioj plene utiligos siajn respektivajn avantaĝojn kaj kune antaŭenigos la disvolviĝon de

Esperanto. ĈEL plifortigos kunlaboron kun UEA ĉe Esperanto-edukado kaj la trejnado de junaj aktivuloj, kaj antaŭenigos la grandan aferon de Esperanto en la plibonigo de internaciaj komunikad-kapablecoj.

Gong Xiaofeng dankis al la prezidanto Liu Dawei pro la forta subteno al ŝia laboro ĉe UEA, kaj klopodos por plifortigi la interŝanĝojn kaj kunlaborojn inter UEA kaj ĈEL.

Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garantii al nia Asocio finanĉan ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

Kiel donaci?

Per banko:

UEA-konto en ING Bank, Postbus 1800,
NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo –
https://revuoesperanto.org/alianco_365.

109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024

Kiom tempo gravas?

■ Mireille Grosjean


Mi devis prelegi je la 20-a horo. Je 19:59 mi aŭdas "... 5, 4, 3, 2, 1, 20:00, Mirejo, vi parolu!" Tio okazis al mi en Japanio. Mi estis tre surprizita. Oni kutimas diri, ke svisoj estas akurataj, sed tiom precizaj ni ne estas. Ĉe ni en Svislando ĝis 15 minutoj da malfruo eblas; pli longa malfruo fariĝas suspekta, iom maldeca. Mi aŭdis, ke en Afriko fama japano fariĝis tre nervoza, kiam pasis la tempo de la komenco de lia prelego, kaj homoj venis, venadis, sen ia urĝo.

En 2011 en la plej granda benina urbo Kotonuo estis organizita publika prelego pri Esperanto. Ni luis salonon, ni anoncis la prelegon ĉe diversaj radioelsendejoj, ni metis afiŝojn. La komenco estis planita por la 9-a horo matene. Je tiu horo mi estis preta por paroli. La salono estis malplena. Homoj venis iom post iom. Je la 10-a horo mi ricevis signon, ke mi povas komenci paroli. Do dum unu horo personoj el la urbo, studentoj kaj aliaj, alvenis, alvenadis trankvile. Tio ŝajnis al mi stranga sinteno. Feliĉe preparante la kun-

sidon, ni povis meti ne nur seĝojn, sed tablojn, tiel ke mi povis meti sur ĉiu tablo etan kalendaron pri Esperanto de la franca junularo. La alvenintoj havis ion por legi kaj ne perdis sian tempon (tia priprenso estas tipe okcidenta...) Ni rimarku, ke temis pri ekstera publiko. Mi ne scias, ĉu la Loka Kongresna Komitato (LKK) antaŭvidas tiajn eventojn okaze de la UK en Aruŝo en 2024. Sed la zorgo de pluraj eblaj kongresanoj estas, kiel komenciĝos niaj programeroj, ĉu ni devos tiom atendi? Se jes, la tuta evoluo de la tago fariĝos fuŝa. Fakto estas, ke dum UK prezentigaĝis ĝis 8 paralelaj prelegoj, debatoj, koncertoj, prezentadoj... Do se ie okazas malfruo, la tuta skemo de la evento miksiĝas kaj ĉiuj migradoj de salono al salono fariĝas maleblaj. Ni nun parolas pri publiko, kiu konsistas el niaj gekongresanoj. Ĉu ni sukcesos eduki ĉiujn al respekto de la du etaj montriĵoj, kiuj kuras malantaŭ la glaco de la horloĝoj? Mi certas, ke la membroj de LKK same kiel la gvidantoj de UEA klarigos la bezonon harmoniigi la horaron de niaj multnombraj eventoj tra la kongresaj tagoj kaj ke ĉiuj komprenos la logikon kaj provos alveni akurate. Se ne, ili maltrafos la komencon de la prelego. Tiam ili pli atentos por la alia vizitota programero. En mia ekzemplo pri prelego en Kotonuo temis pri publika evento, do venis iuj homoj de la urbo; do la situacio ne estis la sama. Plie mi aŭdis, ke en kelkaj landoj de Afriko oni alkutimiĝas al akurateco okcidentstila, do la diferenco malkreskas.

Mia nuna celo estas transdoni faktojn kaj spertojn kaj montri al neafrikanoj, ke bona disvolviĝo de UK en Afriko eblas. Afrikaj kolegoj legas miajn tekstojn kaj komentas ilin cele al adaptiĝo, se bezonatas.

Jen ekzemplo el mia esperantista vivo. Mi venis en 2012 al Senegalio por instrui Esperanton en Rufisko, granda urbo najbara ĉe Dakaro. La gvidantoj



de la Senegala Esperanto-Asocio organizis etan ceremonion malferman invitante la urbestron de Rufisko. Fakte venis la vic-urbestro. Kun malfruo. Ne multe, eble 15 minutoj. Mi vidis lin, li estis en la oficejo de la direktoro de la ŝtata lertigejo, kie ni povis lui klasoĉambron. Li parolis kun la direktoro. Eble li parolis dum 20 minutoj. Mi volis, ke nia tago komenciĝu, mi volis tiri lin per la maniko, tamen tion mi ne faris. Mi iris kaj trovis la du virojn en trankvila interparolado. Mi atendis. Post kelkaj frazoj la vic-urbestro adiaŭis la direktoron kaj ni kune paŝis tra la vasta korto por atingi nian klasoĉambron. Li parolis: «Sinjorino! Sciu, ke mi bone konas Esperanton. Mi estis en Sofio, en Bulgario, en la jaro 1985. Mi estis konsilanto de Unesko dum tiu Konferenco. Ne mi verkis la rezolucion pri Esperanto, sed mi multe diskutis kun via kolego Tibor Sekelj.» Mi estis mirigita. Ni atingis la klasoĉambron kaj mi petis lin rediri tion al la gestudenta grupo. Estis tre grava tago por ĉiuj, ni estis kune kun aktoro de tiu grava evento de 1985. Espereble la gvidantoj de UEA legos tiun ĉi tekston kaj kaptos la afrikan kutimon, ke oni unue salutu la majstron de la loko. En Torino ni havis la ŝancon konatiĝi kun la direktorino de la kongresejo de Aruŝa, kiu partoprenis la tutan semajnon de UK-2023 kaj eĉ kantis kun la afrika grupo la faman kanzonon *Malaiika* dum la Internacia Arta Vespero. Ŝin la organizantoj de la UK devos viziti kaj saluti tutunue.



En aliaj cirkonstancoj mi povis observi, ke prioritatoj malsamas. Dum por mi gravas alveni ĝustatempe por fiksita rendevuo, afrikanoj restis en kunsido pro la fakto, ke la kunsido es-

tis gvidata de maljunaj gravuloj. La respekto al aĝuloj multe pli gravas ol akurateco en rendevuo.

Konklude ni konstatas, ke la kurtimoj pri akurateco enorme varias de

kulturo al kulturo, kaj ni ĉiuj devos akcepti kompromisojn por ebligi harmonian disvolviĝon de la diversaj eventoj, kiuj konsistigas Universalan Kongreson de UEA.

Universala Kongreso

Bonvenon al la 109-a UK, la kanto

La jam konata Esperanta kantisto Joel Muhire (Joe Mo) verkis la tekston kaj komponis la tekston por la kanto *Bonvenon al la 109-a UK*.

La filmeto kun ĝi spekteblas kaj aŭskulteblas en la jutuba kanalo UEAViva: <https://mallonge.net/164>

La Afrika komisiono kunlabore kun la tanzania Landa Asocio laboregas por certigi la unikecon de la unuafoja UK en Afriko.



Aliĝu al la 109-a UK per la jena ligilo: <https://uk.esperanto.net/2024>

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



SOCIETO ZAMENHOF
Francio: S. Amariglio.

DONACOJ
ĝis la 5-a de novembro 2023

**Amsterdamo Katedro
pri Interlingvistiko kaj
Esperanto**
Germanio: Germana

Esperanto-Asocio 500,00.
Nederlando: Esperanto
Nederlando 250,00.
Sumo ĉi-jara: 10997,00.

Fondaĵo Afriko
Por la UK en Arusha
(Tanzanio):
Nederlando: anonima 5000,00.
Sumo ĉi-jara 15049,05.

Fondaĵo Azio
Japanio: Aoyama A., Onishi
S. - po 19,10; Gotoo Y. 25,47;
Sanpei K. 12,73.
Sumo ĉi-jara: 724,38.

Fondaĵo Canuto
Finlando: B. Eriksson 150,00.
Luksemburgo: I. Ertl 20,00.
Nederlando: R. Moerbeek 25,00.
Sumo ĉi-jara: 1452,49.

Fondaĵo Partoprenu UK-n
Usono: M. Kennedy 500,00.
Sumo ĉi-jara: 722,00.

Virtuala Kongreso 2023
Sumo ĉi-jara: 4534,00.

Fondaĵo Wüster
Ĉeĥio: L. Hakl 20,00.
Sumo ĉi-jara: 32,00.

Ĝenerala Kaso
Britio: M. Sunder 10,00.
Germanio: A. Nonima (2x) -
po 888,76.
Nederlando: B. Muizelaar-
Borger 300,00.
Alianco 365: 155,00.
Sumo ĉi-jara: 11448,35.

Kuniĝu ĉe Taso da Teo – komenciĝis nova turneo de Teo, Amo kaj la Mondo

Tianjin-a Esperanto-Asocio

Antaŭ ses mil jaroj ĉinoj komencis planti te-arbon, antaŭ unu mil jaroj teo ekdisvastiĝis de Ĉinio al aliaj landoj. Nun en la mondo pli ol sesdek landoj produktas teon kaj du trionoj de la loĝantaro de la mondo trinkas teon.

Nia lingvo, uzata en pli ol cent dudek landoj de la mondo, servas kiel neŭtrala komunika ponto inter la popoloj de diversaj landoj kaj celas pacon kaj pli bonan mondon.

Teo, verda trinkaĵo, plus Esperanto, verda lingvo, fariĝas kerno de la projekto *Teo, Amo kaj la Mondo*, kiu estis lanĉita komune de Tianjin-a Esperanto-Asocio (TEA), Tianjin-a Universitato de Scienco kaj Teknologio (TUST) kaj Tekultura Bazo en Hangzhou en 2019 sub aŭspicio de Te-amanta Esperantista Organizo (TEO), kaj enhavas ekspoziciojn tra la mondo, ĉeestajn kaj virtualajn prelegojn kaj kursojn, kaj fizikajn vojaĝojn ktp. De oktobro 2019 ĝis oktobro 2023, la ekspozicio *Teo, Amo kaj la Mondo* estas sukcese gastigita de dek tri urboj de naŭ landoj danke al esperantistoj. Ili estas:

Tianjin de Ĉinio en 2019; Herzberg de Germanio en 2019 kaj 2020; Nový Jičín de Ĉeĥio en 2020; Svitavy de Ĉeĥio en 2020; Slatino de Rumanio



Per video salutis esperantistoj kaj te-amantoj de 10 landoj. Sur la foto salutas Yusuf Abdullaev, rektoro de la uzbekia Samarkanda Internacia Teknologia Universitato, en la uzbeka lingvo

en 2020; Glazov de Rusio en 2020; Viŝagino de Litovio en 2020; Žilina de Slovakio en 2020; Banja Luka de Bosnio-Hercegovino en 2020; Doboj de Bosnio-Hercegovino en 2020; Pekino de Ĉinio en 2020; Samarkando de Uzbekio en 2023; Samara de Rusio en 2023.

La unua turneo estas la “vojaĝo” de nia lingvo, ankaŭ montriĝo de kultura diverseco kaj reciproka lernado inter diferencaj civilizacioj. Pli grave estas, ke la vojaĝo de teo kaj nia lingvo donis trankvilon kaj kondolencon al homoj, kiuj suferis malbonaĵojn, kiel la malsano KOVIM-19.

Pro tio, nova turneo komenciĝos la 19-an de oktobro en la bela aŭtuna ĝardeno de TUST. La malferman ceremonion prezidis studento de la universitato en la ĉina lingvo kaj Lisa, vicĝenerala direktoro de TEA, en Esperanto. Ĉeestis pli ol cent gastoj el eldonejoj, teaj fabrikoj, universitatoj, Ĉina Esperanto-Ligo, Pekina Esperanto-Asocio kaj mediatoj. Ankaŭ per video salutis Margaret Zaleski-Zamenhof, Nisnaga Atusi (Acero), Ilia Dewi, Alessandra Madella, Hana Dynková, Petro Zilvar, Ljubiša Preradović, Tatjana V. Svitova, Yusuf Abdullaev kaj stu-



dentoj de Monglio. Profesorino Wang Xufeng, tea fakulo, ĉina verkisto kaj honora membro de TEO, kiu antaŭe lanĉis kaj sukcesigis la filmkonkurson *Teo kaj Amo*, en sia salutmesaĝo diris, ke ŝi sentas sin profunde emocia pro la daŭrigo de la projekto *Teo, Amo kaj la Mondo*, volas kontribui plu por reklamado de Esperanto kaj kulturaj interŝanĝoj de popoloj per tea kulturo. Ŝi proponis fari te-tablon por la tuta mondo por ke loĝantoj de la Tero komune ĝuu teon ĉe la tablo. Samtempe en sia prelego Wang substrekiis samajn karakterizaĵojn inter te-amantoj kaj esperantistoj, aldonante, ke TEO, kunlabora faka asocio de UEA, kiu bone kaj efike ligas te-amantojn kaj esperantistojn, certe ludos gravan rolon en la estonteco.

Profesorino Gong Xiaofeng (Arko) en sia prelego *Rolo de Esperanto en Internacia Komunikado* konigis nian lingvon kaj la movadon, specife prezentis UEA kaj ĝian strategian planadon. Ŝi aparte menciis la agadon de TEO post ĝia fondiĝo en 2019.

Hu Kaimin, direktoro de Fremdlingva Eldonejo, merite aplaudis la gravan rolon de Esperanto kaj klare esprimis la volon eldoni pli da libroj en Esperanto pri tea kulturo. Kaj Wang Hanping, vicprezidanto de ĈEL, esprimis subtenon al la projekto, dirante, ke kiel hejmo de esperantistoj ĈEL bonvenigas esperantistojn tra la mondo.

Invitite la kvar gravuloj, la vicdirektoro de TUST s-ino Wang Min kaj la vicdirektoro de ĉina mediato CRI ONLINE



Rafael Henrique Zerbetto kaj Zhao Wenqi (Venki) prelegis respektive pri porcelano en Brazilo kaj pri propra sperto de Esperanto

s-ro Liu Chi fariĝis konsilianoj de la nova turneo de *Teo, Amo kaj la Mondo*.

Nome de TEA, la vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de TEA s-ro Han Daqiang resumis la ĉefajn karakterizaĵojn de la E-movado kaj prezentis gravajn avantaĝojn kaj signifojn de la projekto *Teo, Amo kaj la Mondo* en la nuna mondo. Li dankis ĉiujn subtenantojn, helpantojn, partoprenantojn, kontribuantojn kaj kunlaborantojn kaj esprimis decidemon daŭrigi la projekton turnei tra la mondo.

Antaŭ la oficiala malfermo la gastoj aprezis skriban intervjuon kun la organizantoj de la ekspozicio *Teo, Amo kaj la Mondo* en la dek tri urboj de la naŭ landoj en la formo de standoj kun fotoj kaj tekstoj. Han Daqiang, la vicprezidanto de TEA, faris klarigon. Samtempe sur ekranoj ripetigis la video “*Stafeto – Ĉu vi trinkis teon hodiaŭ?*” kaj en la enirejo de la domo, kie okazis la evento, kaj en la kunvenejo. En la video 71 amikoj

el 25 landoj uzas Esperanton, la gepatrajn lingvojn kaj la ĉinan lingvon por diri la frazon “*Ĉu vi trinkis teon hodiaŭ?*”. Kaj pli ol duono unuafoje provis paroli en Esperanto. La stafeton TEA lanĉis kaj ekkolektis en aprilo de la kuranta jaro, celante riĉigi la projekton *Teo, Amo kaj la Mondo*, montri la diversecon de lingvoj kaj la facilecon de nia lingvo. Nun la stafeto daŭras akompanante la projekton.

Videblas la stafeto ĉe <https://mallonge.net/15b>.

En la unutaga malfermo, Rafael Henrique Zerbetto kaj Zhao Wenqi (Venki) prelegis respektive pri porcelano en Brazilo kaj pri propra sperto de Esperanto. Ankaŭ fakuloj el la tea kulturo, la ĉina tradicia muzikilo *Guqin*, sanigo per pentrado kaj ĉinaj tradiciaj kostumoj faris interesajn reagojn inter studentoj en la universitato.

La malfermon raportis en la ĉina lingvo ĉinaj mediatoj kiel CRI ONLINE kaj *El Popola Ĉinio*. Jen kelkaj ligiloj de raportoj:

<https://mallonge.net/15a>

<https://mallonge.net/159>

<https://mallonge.net/158>

Nova starto, nova aventuro! TEA kaj TEO atendas arde vian aliĝon – nia ĉeftemo estas: “*Kuniĝu ĉe taso da teo*”, kaj nia slogano: “*Ĉu vi trinkis teon hodiaŭ?*”

Estas pretaj belaj fotoj, filmetoj kaj fizikaj objektoj pri tea kulturo. Nur skribu vian bezonon, proponon aŭ planon kaj klaku “*sendu*” por sendi vian mesaĝon al ni TEA_ESPERANTO@hotmail.com aŭ 65202258@qq.com.

Kun taso da teo ni bondeziras al vi pacon kaj sanon!



Sperto de tea kulturo

Serio: Pri katedro sed ne el katedro Kio bolas en la Amsterdama kaldrono

Federico Gobbo,
Universitato de Amsterdamo

Amsterdamo, la ĉefurbo de Nederlando, estas la sidejo de la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo. Krome, ĝi gastigas la neformalan lokan grupon La Amsterdama Rondo¹, kaj fine de la Esperanto-Ateliero en Ĝogaraĝo², unu el la lastaj domokupadejoj de la urbo laŭleĝaj kaj ankoraŭ aktivaj. En ĉiuj tri realaĵoj iel engaĝiĝas la aŭtoro de ĉi tiu artikolo, kaj la ĉefan rolon li ludas kadre de la universitata katedro. Kiel multaj legantoj de la revuo *Esperanto* jam scias,³ la katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto estas speciala: tio ne estas kvalita prijuĝo, sed teknika difino por indiki katedrojn kies sponsoro estas eksteruniversitata (ĉiam NRO aŭ kultura institucio) kaj kies kontrakto postulas partatempan laboron – en la specifa kazo, po unu tagon semajne. La katedron estras la aŭtoro de ĉi tiu artikolo dum preskaŭ dek jaroj, kaj ekde la 1-a de februaro 2024 komenciĝos lia tria mandato, do lia tria kvinjarlonga periodo, planita ĝis januaro 2029 inkluzive.

Ĉi tiu artikolo celas doni superrigardon pri la lastatempaj evoluoj de la katedro en Amsterdamo kaj aliaj agadoj rande al ĝi. Laŭ la akordo inter UEA, la sponsoro de la katedro, kaj la Universitato de Amsterdamo, la katedrulo respondecas pri kelkaj taskoj, kiujn oni povas grupigi jene: instruado; videbligo; esplorado. La ĉefa instruada tasko estas respondi pri la kurso pri interlingvistiko (instruata en la angla) kaj Esperanto (rektameto en Esperanto, kaj pri la gramatiko kaj la kulturo en la angla) ĉiun akademian jaron. Dum antaŭ la pandemio la kvanto da studentoj partoprenantaj ek-

de la unua leciono ĝis la fina testo ofte superis la dekon, post la jaro 2020 la studentoj kiuj finfine trapasas la ekzamenon estas ofte 8-9, kaj pri Interlingvistiko kaj pri Esperanto – notindas ke, krom malmultaj esceptoj, la kursanaro de Interlingvistiko kaj Esperanto estas farataj de du apartaj grupoj.

La Esperanto-Ateliero en Ĝogaraĝo helpas al la kurso pri Esperanto en la universitato duflanke: unuflanke, ĝi estas kroma okazo praktiki la lingvon, aparte donante la okazon sperti konversacion inter fluaj parolantoj, kiu estas sperto tute neebla en la ĉeuniversitata klaso, ĉar la nura flua parolanto estas la instruisto. Aliflanke, povas okazi, ke studento de la Universitato de Amsterdamo danke al Ĝogaraĝo ekscias pri la oportuno elekti kurson pri Esperanto kaj decidus aliĝi. La aprezo de la instruada agado, jam videbla per la nomumo kiel *UvA Lecturer of the Year* en 2021 kaj 2020, estis konfirmita en oktobro 2023 per la nomumo en alia, pli vasta, premio, kiu koncernas ambaŭ universitatojn de la urbo.⁴ La kialoj laŭ kiuj la studentoj aliĝas al la kurso de Esperanto estis la ĉefa temo de la du intervjuoj kiujn la katedrulo havis kun du gravaj gazetoj en Nederlando: *Het Parool* (laŭlitere, La Patrolo) tagĵurnalo kiu kvazaŭ ludas la rolon de la novaĵa voĉo de Amsterdamo, kaj *De Groene Amsterdammer* (laŭlitere, La Verda Amsterdamano), semajna gazeto kies interesoj estas internaciaj malgraŭ la nomo, internaciaj larĝperspektivaj: filozofia, politika, beletra, liberala arta.⁵

Intervjuoj kiel ĉi tiuj estas parto de la videbligo de la katedro. Ene de Esperantujo, krom redakti la esperantigon *De Cock kaj la morto en preĝo*, la krimromanon tradukitan de grupo de nederlandaj esperantistoj kaj je libera

dispono de la esperantistaro⁶, estis aliaj agadoj en la lastaj du jaroj. Mi menciui la plej gravajn. Lastatempe estiĝis partopreno al IRIS, la reta interfaka simpozio de TEJO, per video pri la rezulto de komparo inter denaskuloj de Esperanto kaj de signolingvoj, obtenita per kunlaborado kun ĉina kaj usona esploristinoj.⁷ En la Universala Kongreso en Torino tre pozitive impresis la koncerto de Kjara, anoncanta sian novan albumon, laŭ la titolo *Nuda*. La esperantigon de la kantotekstoj faris la aŭtoro de ĉi tiu artikolo. En 2022 la katedrulo partoprenis la Germanan Esperanto-Kongreson, organize kun la kunlaboro de Esperanto Nederland. La kongresa temo, 'Daŭripovo', estis de li pritraktita rilate al lingvopolitiko kaj -planado, kaj la prelego legeblas senpage en la aktoj de la kongreso.⁸ Landnivele, alian eventon organizis en la Groningeno Esperanto Nederland, kadre de la sama Erasmus+a projekto, en kiu la katedrulo donis prelegon kaj agis kiel interpretisto de kolegino el la Groningena universitato, kiu prelegis pri la situacio en Palestino antaŭ la fondiĝo de Israelo, temo kiu nuntempe estas bedaŭrinde tre aktuala. Kutima kunlaboro kun Esperanto Nederland okazas dum la studsemajnfinoj en Krikenhaar, dum kiu la supernivela kurso celas kulturigi la partoprenantojn per analizo de originalaj materialoj de niaj pioniroj, tra legado, komentado, klarigado, kaj fine kunverkado. Kelkaj rakontetoj aperis ie tie tra la verda gazetaro, kun mencio kiel aŭtor(ar)o 'Krikenahara opo', en kiu la opo ŝanĝiĝas laŭ la nombro de la partoprenantoj. Planatas libreto kiu rakontas verke la sperton de la pasintaj eldonoj de la superaj kursoj, komence de specimenoj el la originala verkaro de Za-

menhof, ĝis la unua numero de *Literatura Mondo*, kun speciala atento al la rolo de Kalocsay, ofte konsiderata la dua patro de Esperanto.

Ekster Eŭropo, en 2022 okazis tri eventoj, du en Japanio, unu en Kostariko, rilate al Esperanto. Profesoro Goro Christoph Kimura invitis la katedrulon gastlecioni al liaj studentoj de Esperanto en Sofia Universitato, kaj Japana Esperanto-Instituto invitis lin malfermi la landan kongreson per video pri la perspektivoj de la Esperanto-Movado en la Kovima Erao. La evento en Kostariko estis salutmesaĝo al la studentoj de Esperanto en tiu universitato, kies kerna figuro estas profesoro Jorge Antonio Leoni de León. Fine, rando de Esperantujo, mi konsideras la prelegon itallingvan faritan interrete en 2022 por la Poliglota Kunveno, kies organizo estas en la manoj de profesia teamo de esperantistoj.⁹

La videbliga agado ne limiĝas al Esperantujo. Mi traktu aparte la agadon ene de la Universitato de Amsterdamo. Unue, post la evento en Groningeno antaŭe menciita, la koleginio rekomendis la nomon de la katedro por eniri la redaktaron de la libroserio *Lingvoj kaj Kulturoj* en la Historio ene de la Amsterdama Universitata Eldonejo, kaj li akceptis.¹⁰ Due, la doĵeno de la Fakultato pri Humanistiko, en kiu troviĝas la grupo de lingvistoj, ĉi-jare intervjuis la katedrulon en sia

podkasto dulingva nederlanda-angla, kiu estas sufiĉe populara ene de la universitato.¹¹ Ekster la universitato, estis aliaj okazoj por videbligi la Amsterdaman katedron. Ekzemple, pro sia membreco en internacia pensularo pri Artefarita Intelektu, la Instituto pri la Futuro de la Vivo,¹² la katedro estis intervjuita itale de unu la plej influaj podkastistoj pri la temo en Italio, Michele Laurelli; kompreneble oni pripaŝolis la rilaton inter Esperanto kaj Artefarita Intelektu.¹³ Simila temo, sed en la angla, estis traktita en la podkasto *Atlas Linguae*.¹⁴

Por la universitatoj, la plej grava parto de la agado de katedro kiel la Amsterdama estas la esplorrezultoj. Mi limiĝos al la aro da rezultoj nur pri interlingvistiko kaj esperantologio. Krom la fakartikolo jam menciita supre pri la komparo inter denaskuloj de Esperanto kaj de signolingvoj, estas aliaj rezultoj en la lastaj du jaroj. Mi menci nur la plej gravajn. Aperis komparo inter la filozofioj de Zamenhof kaj Maria Montessori, pri la temo edukado kaj paco, en grava itallingva fakĵurnalo pri pedagogio, kunaŭtorita kun Chiara Bonazzoli, konata instruistino kaj trejnistino de la Metodo Montessori en Italio.¹⁵ En Esperanto aperis en *Beletra Almanako* 46 la definitiva versio de la eseo *Ses difinoj serĉantaj fakon*, kiu celas kompari ses interpretojn de konturoj de la fako interlingvistiko historie por

doni aktualan kaj daŭripovan difinon kiu estu adekvata al la bezonoj de la akademio (minuskle) en la 2020-aj jaroj.

Unuflanke estas esplorrezultoj, aliflanke estas esplorlinioj. En la kaldrono de la esploro pri Esperanto bolas du novaj kunlaboroj – tiu kun la Universitato de Parmo kun amiko kaj kolego asociita profesoro Davide Astori firme stabilas. La unua nova kunlaboro estas kun Emanuele Miola, tipologo, asociita profesoro en la Universitato de Bolonjo, kiu siatempe en Torino eklernis Esperanton kun la aŭtoro de ĉi tiu artikolo; fakartikolo lia en Esperanto baldaŭ aperos en speciala numero de fakrevuo honore al grava interlingvisto kaj esperantologo – mi devas kaŝi la nomon por daŭre teni la surprizon al la honorito. Unua apero estis prelego anglalingva farita al la esplorgrupo pri leksikaj limigoj kaj gramatikiĝo ene de ACLC, la esplorcentro al kiu kaj la katedro kaj la Bolonja kolego apartenas.¹⁶ La dua nova kunlaboro estas kun Pegah Faghiri, postdoktoro esploristino de la Universitato de Amsterdamo pri leksikaj limigoj de gramatikaj strukturoj, aparte de la moderna persa, kiu konas Esperanton pro personaj kialoj kaj petis kunlabori esplicite.

En la venontaj artikoloj de la serio ‘Pri katedro sed ne el katedro’, specifaj esplorrezultoj estos priskribitaj en populariga stilo, speciale por la legantoj de la revuo *Esperanto*.

Referencoj

¹ Konstanta retejo: <https://amsterdamo.nl/>

² Konstanta retejo: <https://joesgarage.nl/>

³ En novembro 2021 aperis artikolo ĉi tie laŭ la titolo *Katedrule sed ne el katedro* pri la sama temo. Ĉi tiu artikolo estas kvazaŭ natura sekvo de tiu artikolo.

⁴ La premio, kiu alvenis al sia dua eldono, estas aljuĝita fare de Amsterdama Juna Akademio, por premii universitatajn instruistojn por ilia agado en instruado, socia impakto, kaj subteno al la akademia komunumo. Estis preskaŭ 50 nomumitoj entute. Por pli da informo: <https://amsterdamyoungacademy.nl/>

⁵ En *Het Parool* aperis dupaĝa dosiero pri la agadoj de La Amsterdama Rondo, post la publikigo de la esperantigo de la krimromano de fama amsterdamana verkisto, Baantjer, kiu inkluzivas parton pri la Amsterdama katedro. La aperigo de la intervjuo en *De Groene Amsterdammer* estas planita en decembro 2023.

⁶ Rekta ligilo por deŝuti la PDFon: <https://mallonge.net/15c>

⁷ Video spektblas Jutube: <https://mallonge.net/15d>. Aperos artikolo pri la temo ĉi tie en la revuo *Esperanto*.

⁸ La volumo aĉeteblas paperforme kaj deŝuteblas bitforme: <https://www.esperanto.de/de/node/2995>

⁹ Rekta ligo al la Jutuba video: <https://mallonge.net/15f>

¹⁰ Priskribo de la libroserio, anglalingve: <https://www.aup.nl/nl/series/languages-and-culture-in-history>

¹¹ Rekta ligo al la nederlanda priskribo kaj epizodo: <https://mallonge.net/15e>

¹² Hejmpaĝo, anglalingva: <https://futureoflife.org/>

¹³ Rekta ligo al la epizodo, itallingva: <https://www.ai-blog.it/men-tibrillanti/episodio6/>

¹⁴ Hejmpaĝo de la podkasto: <https://www.ochentastudio.com/atlas-linguae>

¹⁵ Rekta ligo: <https://mallonge.net/15g>

¹⁶ Vidu prezenton pri ACLC en la supre menciita artikolo *Katedrule sed ne el katedro*, novembro 2021. Jarraporto anglalingva aperis je la fino de oktobro 2023, pri la jartrio 2020-2021-2022: <https://aclc.uva.nl/about/annual-reports/annual-reports.html>

Varsovio, Roterdamo, Herzberg kaj tiel plu!

Mireille Grosjean.

Responde al J. C. Fighiera en RE

Herzberg kaj ĝia elstara statuso en nia Movado estas grandparte sukceso de la strebadoj de Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar. Ni gratulu ilin! Ili gvidu nin al plua pripensoj pri tia agado en aliaj urboj. Kial ne en La Chauv-de-Fonds, Svislando? Kial ne en St Martin d'Arcé, Francio, kie situas la kastelo Greziljono? Kial ne en Aalen, Germanio, kie situas la biblioteko de Germana Esperanto-Asocio? Kial ne en Zaozhuang, kie fortas la poresperantaj agadoj kiel universitato, kursoj, muzeo, arkivejo?

Ekzistas plano por krei Esperanto-vilaĝojn kaj Esperanto-urbojn laŭ la modeloj de Pluezek (Francio) kaj Herzberg (Germanio).

Jen ĝi:

Por esti Esperanto-vilaĝo, vi devas

- meti laŭ la ĉefstratoj en 2-3 ĉefaj enirvojoj de la vilaĝo la ŝildon *Esperanto-vilaĝo*
- havi minimume dek librojn en Esperanto aŭ pri Esperanto aŭ vortarojn en la vilaĝa biblioteko, aŭ en la vilaĝa administrejo aŭ en la vilaĝa lernejo
- akcepti Esperanto-staĝon, eventon en la vilaĝo per faciligoj laŭ viaj ebloj
- salutigi la partoprenantojn de tiaj eventoj aŭ salutigi gravulojn de la Esperanto-movado alvenintajn en via vilaĝo fare de la vilaĝestro, prezidanto aŭ simila gravulo de via vilaĝo
- posedi Esperanto-flagon kaj uzi ĝin laŭ la eventoj
- meti je senpaga dispono klasoĉambron, kaze ke estas surloke instruisto de Esperanto kaj interesatoj, kiuj volas lerni la lingvon
- meti la informon pri via statuso de Esperanto-vilaĝo en via oficiala retejo en la loka lingvo
- decidigi esti Esperanto-vilaĝo fare de la vilaĝa parlamento aŭ vilaĝestro aŭ administrejo depende de la lokaj strukturoj

Por esti Esperanto-urbo, vi devas

- meti laŭ la ĉefstratoj en 4-5 ĉefaj enirvojoj de la urbo la ŝildon Esperanto-urbo
- havi minimume 25 librojn en Esperanto aŭ pri Esperanto aŭ vortarojn en la urba biblioteko, aŭ en la urba administrejo aŭ en la urba lernejo
- akcepti Esperanto-staĝon, eventon en la urbo per faciligoj laŭ viaj ebloj
- salutigi la partoprenantojn de tiaj eventoj aŭ salutigi gravulojn de la Esperanto-movado alvenintajn en via urbo fare de la urbestro, prezidanto aŭ simila gravulo de via urbo



- posedi Esperanto-flagon kaj uzi ĝin laŭ la eventoj
- meti je senpaga dispono klasoĉambron, kaze ke estas surloke instruisto de Esperanto kaj interesatoj, kiuj volas lerni la lingvon
- meti la informon pri via statuso de Esperanto-urbo en via oficiala retejo en la loka lingvo
- decidigi esti Esperanto-urbo fare de la urba parlamento aŭ urbestro aŭ administrejo depende de la lokaj strukturoj

Kompreneble tiuj du dokumentoj estas skizoj plibonigeblaj. Estus bone, ke UEA mastrumu la agadon kaj preparu belan atestilon transdonotan al la nova Esperanto-urbo aŭ vilaĝo okaze de digna publika evento.

Jen sugesto de Mirejo.



Kotiztabelo de UEA por 2024

Lando/valuto	MB(-T)	MA(-T)	MBT-50%	MBT-75%	SA	Kto	PT
Aŭstralio/dolaro	70	115	35	17	75	40	135
Aŭstrio/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Belgio/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Brazilo/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Britio/pundo	40	67	20	10	41	23	79
Ĉeĥio/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Danio/krono	330	560	165	85	335	190	660
Estonio/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Finnlando/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Francio/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Germanio/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Greklando/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Hispanio/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Hungario/forinto	4560	14300	2280	1140	15000	3900	14300
Irlando/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Islando/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Israelo/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Italio/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Japanio/eno	5720	9620	2860	1430	5750	3250	11440
Kanado/dolaro	70	115	35	18	71	39	135
Kroatio/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Latvio/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Litovio/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Nederlando/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Norvegio/krono	428	720	214	107	490	245	850
Nov-Zelando/dolaro	76	126	38	19	79	43	150
Pollando/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Portugalo/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Rusio/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Slovakio/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Slovenio/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Svedio/krono	462	780	230	115	530	265	925
Svislando/franko	52	87	26	13	53	30	104
Usono/dolaro	54	89	27	14	55	30	106
Landaro 5/eŭro	44	74	22	11	45	25	88
Landaro 4/eŭro	27	57	14	7	45	18	44
Landaro 3/eŭro	14	44	7	4	45	12	44
Landaro 2/eŭro	7	37	4	2	45	12	44
Landaro 1/eŭro	2	32	1	1	45	12	44

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estas farita antaŭ la oficiala komunikado de nova kotiztabelo.

Se via lando ne estas en la listo, bv. kontroli la kotizojn ĉe: <https://uea.org/altgnoj/kotiztabelo>.

MB: Membro Baza: kun reta revuo Esperanto, reta kontakto, Delegita Reto (reta jarlibro), Rabato ĉe UK kaj JJK.

MA: Membro-Abonanto: Kiel MB plus la revuo Esperanto papere.

MB(-50%): Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro estas 20–25-jara je la komenco de la kotizata jaro).

MB(-75%): Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro ne estas pli aĝa ol 19 jarojn je la komenco de la kotizata jaro).

SA: Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA.

KTO: Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO.

PT: Patrono de TEJO: pagas la kotizon por subteni TEJO-n (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

Fariĝu membro SZ en 2024
Membro SZ kostas aldone
2 x Kotizon MA.
Subtenu la asocion!

MB(-50%): Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro estas 20–25-jara je la komenco de la kotizata jaro).

MB(-75%): Baza Membreco kun TEJO-rabato (membro ne estas pli aĝa ol 19 jarojn je la komenco de la kotizata jaro).

81-a Hispana Kongreso de Esperanto en Seviljo 12-15.10.2023

■ Liba Gabalda

La 81-a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en la tre bela andaluza urbo Seviljo, nomata perlo de Andaluzio. Post Madrido, Barcelono kaj Valencio ĝi estas la kvara plej granda urbo en la lando. Trafluas ĝin la rivero Guadalquivir. Seviljo famas pro flamenko-danco, taŭro-bataloj kaj aliaj tradiciaj festoj. La katedralo de Seviljo estas la tria plej granda en Eŭropo. Imponas ankaŭ la reĝpalaco *Alcázar*, unu el la plej antikvaj en Eŭropo kaj la plej bela en Hispanio. La majesta katedralo Sankta Maria 130 metrojn longa kaj 76 metrojn larĝa estas la kvara plej granda en la mondo. La ĉefplaco *Plaza de España* estas belega duoncirkla historia monumento. Alia simbola monumento estas la *Torre del Oro* (Ora Turo), en kiu troviĝas la muzeo pri maraĵoj. En Seviljo oni trovas monumentojn de romiaj, arabaj kaj eŭropaj stiloj, multajn parkojn, muzeojn kaj aliajn belaĵojn. En la urbo moviĝas 99 ĉeval-ĉaroj por promeniĝi turistojn. Dum la kongreso ne estis multaj ebloj vidi ĉion vidindan. La sabatan matenon esperantistoj povis viziti la Belartan muzeon. Ĉe la metroo-stacio *Puerta Jeréz* ekstere en la apuda pasejo estis instalita ekspozicio de pentraĵoj de famaj pentristoj el la muzeo de Prado.

La kongresa temo estis: **“Komprenemo inter popoloj”**. Pri ĝi amplekse prelegis ĉe la fino de la kongreso la prezidanto de UEA Duncan Charters. Al la kongreso aliĝis pli ol cent kvindek esperantistoj el pli ol dudek landoj. La kongreson partoprenis krom la Prezidanto de UEA kun sia edzino ankaŭ la ĝenerala direktoro Martin Schäffer kun sia familio. La kongreso okazis en la andaluza sidejo de UGT (ĝenerala unio de laboristoj).

Ĵaŭde, ekde la 10-a horo, okazis akcepto de kongresanoj. Ni ricevis sakon kun la kongresa materialo kaj inter-

tempe oni povis trarigardi la libroservon instalitan en la enirejo. Poste okazis prezentado de la programo. Post la tagmanĝa paŭzo sekvis kunvenoj de la hispanaj Esperanto-asocioj kaj prezentado de la libro *125 años de Esperanto en Sevilla* (125 jaroj de Esperanto en Seviljo), kiun oni povis aĉeti surloke. En la Vespere okazis festeno kun multaj manĝaĵetoj, dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj omaĝe al la 112-a datreveno de la fondiĝo de la esperantista grupo de Seviljo.

La inaŭguro okazis vendrede je la 10-a horo en la salono Zamenhof. La ĉeestaron alparolis salutante Antonio Rodríguez Gasch, José Roldán León (prezidanto de LKK), Ángel Arquillos (prezidanto de HEF), Duncan Charters (prezidanto de UEA), Laŭra Brazzabeni (ILEI) kaj Rodica Todor (IFEF-prezidantino). Sekvis salutoj de aliaj asocioj kaj muzika paŭzo. Poste ni povis spekti filmojn pri Esperanto en Tubaro. Unue Pablo Busto klarigis kiel akiri ilin. Gabriela Manzano kun sia patro Viko prezentis kelkajn amuzaĵojn el “PIKA PIKA ESPERANTO”. Aliloke okazis kurso por komencantoj. Sekvis prelego: “Libera kulturo kaj liberaj programoj, ankaŭ en Esperanto”, “Instruado de Esperanto en la andaluza publika edukistemo” al kiu alvenis kelkaj lernantoj de mez-

lernejo. Poste ni ĝuis la teatraĵon “La akuzantivo aŭ la kazo pri malklera tatuisto” prezentatan de la “Talenta Teatra Trupo”. Sekvis prelego “Deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco”. Akompane de citro ni povis aŭskulti poeziaĵojn prezentitajn de Ana Manera kaj Ángel Arquillos. Pri la spaca programo Artemis kaj reveno al la Luno interese parolis Carlos Spinola. La lasta prelego, mallongigita pro manko de tempo, temis pri ĉinaj ideogramoj.

Sabate posttagmeze la teatraĵo “La gazetara konferenco” estis prezentita de la “Talenta Teatra Trupo”. Aliloke okazis ateliero pri Esperanto. Sekvis prelegoj: “Minimumismo bonas” kaj “La bibliotekoj tra la historio”. Vespere ni spektis pupteatron kaj grupo de bele vestitaj kastanjet-ludistinoj prezentis belan spektaklon en la ritmo de fona muziko.

Dimanĉe matene ni spektis la teatraĵon “La pomo de Adam”. Poste okazis aŭkcio gvidata de Tonyo del Barrio. Sekvis prelego de Duncan Charters kaj la oficiala fermo de la kongreso. Dum tiuj tagoj regis varma (eĉ varmega) suna vetero, do multaj plene interesiĝis pri la kongresa programo. Oni povas konstati, ke la kongreso estis sukcesa kaj bonetosa. Koran dankon al la organizintoj pro tiu agrabla evento.



81-a Hispana Antaŭkongreso de Esperanto en Seviljo 10-11.10.2023

En la sevila universitato (fakultato pri filologio) okazis **Internacia Seminario pri Sociaj Retoj kaj Homa Konduto**, konsiderata kiel la hispana antaŭkongreso. La seminario estis organizita de "Civiencia" sub la gvido de la universitata profesoro pri psikologio Vicente Manzano Arrondo (kromnomo Viko), kiu sukcesis arigi plurajn universitatajn profesorojn de la mondo kaj aliajn gravajn personojn por prezentado de interesaj prelegoj. Ni povis aŭdi prelegantojn el Hispanio, Fran-

cio, Germanio, Italio, Irano, Japanio, Kostariko, Rusio, Serbio kaj Usono.

Viko malfermis la seminarion kaj bonvenigis la ĉeestantojn. Poste alparolis nin la UEA-Prezidanto Duncan Charters. La seminario estis tre intensa, foje la tekniko misfunkciis, sed tamen ĉiuj prelegoj povis okazi ĉeeste aŭ virtuale. Dum la prelegoj okazis samtempa interpretado inter Esperanto kaj la hispana lingvo. Al la seminario venis ankaŭ kelkaj studentoj kiuj antaŭnelonge komencis lerni Esperan-

ton. Dum la evento estis pritraktataj diversaj interesaj temoj, sekvis debatoj, planado de projekto Erasmus Mundus kaj la jenaj konkludoj:

Aperis ideoj por realigo de projektoj – informteknologia evoluo helpas al esperantistoj por plibonigi la movadon – neceso revivigi la *Sciencan Revolucion* – teknoevoluo helpas, sed la homo gravas – lerni kiel instrui la lingvon kaj la sociajn retojn – utiligi sociajn retojn kaj AI-n (Artefarita Intelekto) por edukado kaj komunikado – profiti de la universitatoj – videbligi kaj realigi originalajn projektojn per Esperanto – ĉio, kio aperas en Esperanto estu fidinda.

Zamenhof-festoj 2023 en *Eventa Servo*: sciigu la mondon pri via evento

Ĉu jarfine vi organizos komunan manĝon aŭ alispecan eventon okaze de la naskiĝtago de L.L. Zamenhof? Ni invitas vin vaste komuniki pri via agado.

Eventa Servo de UEA ebligas krei eventan paĝon per kiu vi povas informi en interreto KIAM okazos KIO KIE. Rapide havi aliron al tiaj praktikaj informoj faciligas la vivon de multjaraj esperantistoj. Trovi ĉiujn informojn pri Esperanto-okazaĵoj en unu centra loko (al)logas novulojn. Vidu <https://eventa-servo.org>.

Pasintjare la teamo de Eventa Servo faris kampanjon pri Zamenhof-festoj tra la mondo. La tiama ligilo <https://zamenhof.eventaservo.org> daŭre funkcias kaj ankaŭ ĉi-jare donas superrigardon pri ĉio, kiam kie kune festos esperantistoj.

Por aldoni eventon al Eventa Servo, necesas registriĝi. Jen instrukcia filmeto kiel fari tion: mallonge.net/es1. Se restas dubo aŭ se vi spertas praktikan malfacilaĵon, ne hezitu sendi retmesaĝon al kontakto@eventaservo.org.



Zamenhof-festoj tra la mondo

Belajn festojn al vi ĉiuj!

(El la Gazetaraj Komunikoj de UEA)

EVENTA SERVO

Eventa Servo estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.

Diskonigu Esperanto-eventojn tutmonde

Spaca Universala Kongreso kaj IKU en UEA-viva kaj la VK

Amri Wandel

En tiu ĉi lasta rubriko de 2023 vi trovos raporton pri la internacia spac-kongreso (IAC23), kiun mi partoprenis en Baku komence de oktobro, informojn pri la registraĵoj de la IKU-prelegoj de Montrealo, kiuj lastatempe aperis en UEA-viva, kaj pri tiuj de Torino, kiuj estos aŭskulteblaj dum la Virtuala Kongreso fine de novembro kaj poste en UEA-viva.

La Internacia Astronaŭtika Kongreso en Baku: la UK de la spacindustrio

Komence de oktobro okazis en la ĉefurbo de Azerbajĝano la 74-a Internacia Astronaŭtika Kongreso (IAC, <https://www.iac2023.org/>) sub la ĉeftemo "Tutmondaj Defioj kaj Ŝancoj: Donu Ŝancon al la Spaco". Partoprenis pli ol 5000 delegitoj el 132 landoj, kaj pliaj 50 000 personoj tutmonde sekvis la programon virtuale. La fokuso dum la ĉi-jara IAC estis daŭripovo, sekureco kaj internacia kunlaboro. Tiu fokusa temo estis efektive praktikita kaj aplikita dum la kongreso, kiel ekzemple la publika ceremonio de subskribo de kunlabora kontrakto pri spacaj aferoj inter Azerbajĝano (reprezentata de la koncerna ministro) kaj Israelo, kiun reprezentis la direktoro de la israela spacagentejo (ISA), kion oni multe raportis en la lokaj amaskomunikiloj. Alia simbola momento okazis kiam mi vizitis la budon de la Saŭda-arabia spacagentejo kaj kiam ili konstatis ke mi estas el Israelo ni spontanee komune fotiĝis. Pli ol 2400 sciencaj kaj teknikaj prelegoj okazis, i.a. reprezentante la universitato de Jerusalemo mi prelegis pri la temo "serĉo de ekstertera vivo", simile al mia IKU-prelego en Torino. Efektive, la IAC similas al la Universala Kongreso en multaj aspektoj. Ĝi estas organizita de la tutmonda tegmenta spacorganizo (la Intenacia Astronaŭtika Federacio), ĉiujare en alia lando. La venonta IAC en 2024 okazos en Milano, kaj la sekva en Sidnejo. Por la IAC de 2026 konkurencis du urboj: Poznań (Pollando) kaj Antalya (Turkio), kiu fine estis elektita. La plej impona kaj populara programero estis la inaŭgura ceremonio, en kiu longe salutis la prezidento de Azerbajĝano, Ilham Aliev. La kongresejo estis la monumenta kongresa centro de Baku, nomita honore al la antaŭa kaj efektive fondinta prezidento, Haider Aliev, la patro de la nuna. Multaj prelegoj kaj diskutoj temis pri diverslandaj spacprogramoj, kiel la flagŝipa misio de NASA "Artemis" kiu celas revenon



de homoj al la Luno en 2025, kaj la sukcesa surluniĝo de Barato en septembro (<https://mallonge.net/15m>). Multan atenton kaptis la inaŭgura prelego de la israela historiisto Juval Noah Harari pri Artefarita Inteligenteco kaj la estonteco de la homaro (<https://mallonge.net/15n>) kaj intervjuo kun Elon Musk, kiu okazis virtuale (<https://mallonge.net/15o>). Okazis vigla kontakto kun la gazetaro, internacia kaj loka, kaj ĉ. 3000 lokaj studentoj kaj profesiuloj kunlaboris. Unu el la popularaj okazaĵoj estis renkontiĝoj kun 17 astronautoj de spacmisioj inter 1969 kaj 2023, kiuj volonte komunikis kun la publiko kaj aŭtografis specialajn memorlibretojn. La kongreso estis multe reklamita sur publikaj anonctabuloj en la tuta urbo. En la unua tago la delegitoj povis ricevi siajn oficialajn nomŝildojn, kiuj estis strikte kontrolataj en la enirejo de la kongresejo, tuj post la alveno jam en la internacia flughaveno. Kiam en sia intervjuo Elon Musk estis demandita, kiam IAC povos okazi en la spaco, li respondis tute serioze: ene de dek jaroj. Mi ne certas pri Universala Kongreso en la spaco, sed unu limon UEA jam pasis, kongresonte en Afriko. Kurioze, samtempe kun la UK en Tanzanio okazos la Ĝenerala Asembleo de la Internacia Astronomia Unio, en Sud-Afriko.

IKU-prelegoj de Montrealo en UEA-viva kaj en la VK

En la pasintjara Virtuala Kongreso (VK22) estis spektiblaj ĉiuj 7 IKU-prelegoj kaj 8 prelegoj de la Scienca Kaf-ejo okazintaj en Montrealo. Simile en la ĉi-jara VK23 inter 23 kaj 26 novembro, reokazos 14 el la 19 IKU- kaj SK-prelegoj



okazintaj en Torino (vidu *Esperanto* 2023:9 p. 184). Lastatempe la IKU-prelegoj de Montrealo estis publikigitaj en la jutuba kanalo de UEA (<https://www.youtube.com/UEAviva>, troveblaj sub la nomo VK22). Kvankam ĉiuj IKU- kaj SK-prelegoj en Torino kiel ankaŭ en Montrealo estis hibridaj, ne multaj deforaj spektantoj efektive utiligis tiun eblon, sekve la eblo re-spekti en UEA-viva kaj dum la VK estos grava por venigi la kongreson al multaj esperantistoj kiuj ne havis la eblon persone partopreni. UEA-viva kaj la VK estos bona okazo ankaŭ por tiuj kiuj ĉeestis la kongresojn sed ne aŭskultis parton aŭ ĉiujn IKU-prelegojn pro programkolizoj.

Tiurilate eblas informi ke aldone al la papera IKU-libro 2023, kiu daŭre estas aĉetebla ĉe UEA, ankaŭ estas

senpage elŝutebla la reta IKU-libro, kun ĉiuj tekstoj de la IKU- kaj SK-prelegoj, kun koloraj fotoj: <http://iku4.trovu.com/>

Cetere pri IKU UEA memorigas pri la invito sendi proponojn por la IKU-sesio en Tanzanio. Vidu uea.org/gk/1134a1. Kiel kutime, la proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto, po proksimume kvin linioj (bv. noti tiun novan limigon!). La proponoj atingu la IKU-sekretarion amri@huji.ac.il plej laste la 31-an de januaro 2024. Kiel en Montrealo kaj Torino, la IKU- kaj SK-prelegoj estos hibridaj, do eblos prelegi per Zoom, kvankam ĉeestaj prelegoj estos preferataj.

Laste Aperis

Abeloj kaj la nevidebla, La. Clemens J. Setz. El la germana trad. D. Karthaus. Novjorko: Mondial, 2023. 369p. 22cm. ISBN 9781595694577. Impona verko pri diversaj planlingvaj projektoj kaj iliaj poetoj kaj poezio, i.a. pri Esperanto. Kun kelkaj ilustraĵoj. € 30,60

Ansereto vojaĝanto / Pate päteestvenik. Elena Popova. Dobriĉ: Matador 74, 2023. 46p. 21cm. Kolorilus. ISBN 978 9543717569. Sep rakontoj taŭgaj por infanoj. Dulingva eldono: E, bulgara. € 4,80

Dio preterpasas. Shoghi Effendi. En Esperanto trad. Bahaa E-Ligo. Offenbach: Bahaa E-Ligo / Mazloun Media, 2023. 466p. 22cm. Bind. ISBN 9783948273057. Funda superrigardo pri la ĉefaj eventoj de la unua jarcento de la Bahaa Revelacio, verkita de la pranepo de la fondinto de la Bahaa Kredo. € 20,40

Esneux-Tilff et la Boucle de l'Ourthe / kaj la Buklo de la Urto. Div. s.l.: Valona Esperanto-Asocio, 2022. 51p. 21cm. Dulingva (E, franca). Kolorilus. Prezento de la valona komunumo Esneux kaj de ĝia sekcio Tilff. € 5,10

Fantaste kaj reale. Ewa Grochowska. s.l.: Eldonejo Libera, 2023. 89p. 21cm. ISBN 9781447630524. La debutnovelaro de la aŭtorino. Kelkaj el ŝiaj noveloj estis premiitaj. € 9,00

Fluganta akrobato, La. Julian Modest. s.l.: Eldonejo Libera, 2023. 46p. 21cm. ISBN 9781447731153. Du fabeloj por infanoj kaj plenaĝuloj, en kiuj la aŭtoro montras profundan filozofion kaj humanismon. € 7,50

Kardoj de Bärägan, La. Panait Istrati. En Esperanton trad. I. Oneț. Rotterdam: Bero, 2023. 105p. 21cm. ISBN 978188225

1452. Trista romano pri la malfacila vivo de la kamparanoj en la sudrumania ebenaĵo komence de la pasinta jarcento. Ĉefverko de la aŭtoro. € 10,80

Mi, Roki. Hundaj kaj kataj historioj. Elena Popova. s.l.: Eldonejo Libera, 2022. 39p. 21cm. ISBN 9781470987312. Historietoj kiuj taŭgas por ĉiuj kiuj ŝatas hundojn kaj katojn. Kun simplaj desegnaĵoj. € 9,60

Platlando. Edwin Abbott Abbott. En Esperanton trad. Hu Shenghao. s.l.: Eldonejo Libera, 2022. 146p. 21cm. ISBN 978 1471653858. Romano pri dudimensia mondo, kies loĝantoj estas plurlateroj. € 12,00

Vervierso, la perdita urbo. En Esperanton trad. J.-M. Jacques. s.l.: s.e., 2021. 60p. 21cm. Ilustrita prezento de la katastrofaj inundoj de la mezo de julio 2021 en Valonio. € 5,10

La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.

Aperis *Belarta Rikolto 2023*, kun premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de UEA

Ĉiujare la novjorka eldonejo Mondial kunlabore kun UEA aperigas la libroforman kajeron *Belarta Rikolto*, enhavantan ĉiujn premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio kaj raporton de la Prezidanto de la Belartaj Konkursoj.

La *Belarta Rikolto 2023* do enhavas poeziaĵojn, prozaĵojn, mikronovelojn, teatraĵojn, monologon/skeĉon, eseojn kaj kantotekstojn. La ĉi-jaraj aŭtoroj estas Nicolino Rossi, Evgenij Georgiev, Jouko Lindstedt, Jorge Rafael Noguerras, Tobiasz Kubisiowski, Carlo Minnaja, Ewa Barbara Grochowska, Christian Rivière, Laure Patas d'Illiers, Debra Hamel, Anastasia Bausk, Francisco Javier Moleón, Raffaele Del Re, Amir Naor, Brandon Sowers, Tomas Frejarö, Serge Sire kaj Antonio Valén. Aldone aperas

la raporto de la Prezidanto de la Belartaj Miguel Fernández.

La libro akireblas i.a. pere de la Libroservo de UEA kontraŭ nur 11,40 EUR. Mendu ĉe: <https://katalogo.uea.org?inf=8029>.

La eldona kunlaboro de UEA kun Mondial okazas ekde la jaro 2013. Ankaŭ ĉiuj aliaj numeroj akireblas ĉe la Libroservo. Klaku ĉi-supre por vidi la plenan liston. UEA regratulas ĉiujn gajnintojn kaj invitas ĉiujn esperantistojn subteni la kulturon en Esperanto kaj aliri la plej nuntempan literaturan produktadon en nia lingvo per aĉeto kaj legado de *Belarta Rikolto 2023*. Bonvenu aliĝi ankaŭ al la informletero Laste Aperis de la Libroservo de UEA pere de: <https://uea.org/vial/retilistoj>.

(El GK de UEA: uea.org/gk/1135)



Edukado

Helpu pligrandigi la Esperanto-familion en du aziaj landetoj

■ Heidi Goes kaj Ĉesko Reale

Komence de 2024 ni volas iri al Orienta Timoro por instrui Esperanton. Ankaŭ survoje, en Singapuro, ni provos iom varbi. Jen ni prezentas nin kaj niajn planojn mallonge. Heidi Goes de 2009 ĝis 2014 plurfoje instruis Esperanton en Indonezio kaj pro la sama kialo jam tri fojojn vizitis Orientan Timoron (3/2013, 8-9/2014 kaj 12/2016). Ŝi sukcesis venigi orienttimoranojn al diversaj E-kongresoj en 2015, 2016, 2018 kaj 2023. Ligiloj pri la antaŭaj vojaĝoj de Heidi al OT aperas en ŝia paĝo ĉe Vikipedio. Pro la daŭraj petoj de la lernantoj kaj ŝia amo al la lando, ŝi ĝojas ke finfine eblas preni sufiĉan liberan tempon de laboro por reiri kaj daŭrigi la instruadon (kaj plulerni la nacian lingvon, la tetunan). Ĉesko Reale akiris la ILEI-diplomon kiel Esperanto-instruisto kaj la IPA-diplomon pri fonetiko. UEA-reprezentanto ĉe UN ekde 2008, li prezentas Esperanton en lernejoj kaj

universitatoj ekde 2009, estis de 2014 ĝis 2021 kunorganizanto de la Monda Poliglota Kunveno kaj kreis lingvan festivalon en Italio: <https://cescoreale.com/en/project/limbas/>. En lia jutubkanalo vi povas trovi videojn pri liaj agadoj: <https://www.youtube.com/@matematikemulo/playlists>.

Eblos instrui Esperanton pere kaj en la salonoj de la Radio Liberdade (de Teodosia dos Reis Ximenes) kaj probable en la universitato kaj lernejoj. Ĉesko instruos pere de la portugala kaj Heidi pere de la indonezia kaj tetuna. Pro la historio de la lando, ekzistas generacioj kiuj ĝis nun ne bone lernis la portugalan, sed preferas la indonezian, dum la pli junaj kaj tiuj kiuj fuĝis dum la indonezia okupado, parolas pli bone la portugalan.

Akompanos ilin la angola muzikisto Abel Massiala, partnero de Heidi. Li jam koncertis en pluraj Esperanto-eventoj ekde 2020. Li volas kantigi la lernantojn kaj ludi muzikon kun ili. La espero estas ke el tio rezultos koncerto kiu utilas interalie por allogi novulojn.

UEA subtenas la projekton morale kaj finance. Tamen aldonaj rimedoj estas bezonataj urĝe. Ni petas vian donacon por kontribui al la vojaĝkostoj de Heidi aŭ Ĉesko kaj la lernomaterialo. Eblas helpi pere de donaco al la UEA-konto 'timoro' pere de la kutimaj pagmanieroj de UEA: <https://uea.org/alighoj/donacoj>.

Erich-Dieter Krause
(12.04.1935 – 18.10.2023)




Foto: <http://www.fernity.com/doc/karbisto/15035499>

Erich-Dieter Krause mortis la 18-an de oktobro 2023 en Lepsiko. Konata leksikografiisto. Li verkis, interalie, ek-

de la 1960-aj jaroj Germana-Esperantan kaj Esperanto-Germanan vortarojn, kiujn eldonis Enzyklopädie Leipzig, Buske (Hamburgo) kaj MONDIAL (Nov-Jorko). Nur en 2023 aperis lia *Vollständiges Wörterbuch Deutsch-Esperanto in drei Bänden* (Plena vortaro Germana-Esperanto en tri volumoj; 2511 paĝoj). Specialisto pri la indonezia lingvo (Bahasa Indonesia), ĝis sia emiritiĝo en la jaro 2000 li laboris en la Orientazia Instituto de la Universitato de Lepsiko. Li publikigis vortarojn kaj lernolibrojn pri la indonezia lingvo, prelegis en pluraj internaciaj konferencoj pri problemoj de leksikografio de Esperanto kaj de la indonezia kaj publikigis artikolojn pri la influo de aziaj lingvoj al Esperanto. Longtempa membro de UEA, de la Akademio de Esperanto kaj de la redakta komitato de la fakrevuo *Esperantologio / Esperanto Studies*, li ankoraŭ partoprenis baloton en la Akademio unu monaton antaŭ sia morto. Okaze de lia 80-jariĝo, Detlev

Blanke publikigis bibliografion de liaj verkoj en *Informilo por Interlingvistoj* 92-93 (1-2 2015).

Kevin Eardley Bourne
(1956.03.19 – 2023.07.30)

Kristano, muziko- kaj lingvo-amanto. Kevin aktivis en la Esperanto-Kristana movado ekde 1983 en Londono. En 1989 li partoprenis KELI-kongreson ĉe Annan Court, Uckfield, kie li konatiĝis kun pluraj eksterlandaj samideanoj. Li sekretariis por Esperanta Diservo Londona ĝis ĝia finiĝo en 2005 kaj kontribuis al la ekumena himnaro *Adori* (2001).

Frue en 2020 Kevin malsaniĝis kun fina diagnozo de plursistema atrofio kun parkinsonismoj kaj li mortis la 30-an de julio de julio 2023 hospice en Redhill, Britio.

Al la geamikoj li mankegos, tamen firme restos en la memoro.

Marteno McClelland



Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe redakcio@revuoesperanto.org aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono. Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevitajn kaj nerecenzitajn oni fakturos al la ricevinto.



Indekso-2023

A

Adjévi, A. 84–86
Afrika Komisiono 27–29, 107, 119
Afriko 22, 27–29, 30–33, 65, 84–86, 87, 107, 136, 167, 182–183, 199, 236, 248–249
AIS 44, 184–185
Alcalde, J. 185
Amerio, A. 189
Amis, J. 12–15, 80
AMO 11, 68, 151, 179
Artefarita Intelektio 99–101, 102–103
Adúriz, M. G. 201
Auderskaja, T. 79, 152–154

B

Baláž P., 18–19, 76
Belartaj Konkursoj 178–179, 260
Belgio 155, 174
Besenyei-Merger, S. 228–230
Biblioteko Hector Hodler 147–149
Bizono, Ch. 114–115
Blajkov, N. 152–154
Bourne, K. E. 261
Brazilo 47, 115
Brazzabeni L. 10
Briel de Cañas, F. J. 94
Bronštejn, M. 131–132, 177
Bulgario 186
Bute, A. 157–163

C

Charters, D. 3–5, 64–65, 104–106, 133–136, 156, 157–163, 187, 195–196, 223–224, 245–246
Chrdle, P. 140–141
Conceição, L. 116–117
Corsetti, R. 56, 112, 180–181, 187, 210–211, 231

Ĉ

Ĉinio 247, 250–251

D

Daubercies, S. 232
De Jesus, T. J. M. 116–117
De Sena, M. 116–117
De Wit, B. 203
D'Illiers, L. P. 226
Dewi, I. 180–181
Dieumegard, P. 231
Dobrzyński, R. 6

E

Edukado.net 52–53
Elstara Agado 190–191
Emmerich, A. 30
Enketilo 187, 195–196, 223–224, 245–246
Esperanto en universitatoj 128–129, 252–253
Esperanto-Tago 56, 187
Espinosa T. 58–59
Estrara raporto 2022 157–163
Eventa Servo 8, 257

F

Faka agado 93, 106, 250–251
Fake, Science kaj Profesie tra la mondo 44–45, 66–67, 90–92, 118, 142–143, 166, 184–185, 212, 238–239, 258–259
Favre, A. 75
Faragó, K. 82
Ferenczy, I. 82, 215
Figiera G. C. 9, 33, 171, 204–205
Firašana, H. F. 37
Fleury, N. 227
Forpasoj 23, 94, 191, 215, 261
Furoraĵoj de la kongresa libroservo en Torino 225
Furorlisto 71
Futbalo 7, 28, 67, 179

G

Gabalda, L. 40, 137, 155, 202–203, 256–257

Garrido, A. S. 110–111
García, A. 11, 68, 166
Ghimire, Bh. 112
Germanio 38–39, 40, 54–55, 137, 166, 183
Goes, H. 260
Gobbo, F. 252–253
Gong, X. 219–222, 247
Grattapaglia, G. 7
Grosjean, M. 182–183, 199, 232, 236, 248–249, 254
Gutiérrez, M. 11, 68

H

Herzberg 54–55, 183, 204–205
Hispanio 211, 256–257
Huzimaki, K. 113

I

IFEF 174–175
ILEI 10, 78–79
Indekso-2023 262–263
Informado 88
Interkultura Novelo-Konkurso 2-a 81, 228–231
Interlingvistikaj Studoj 128–129
Internacia Kongresa Universitato 90, 142–143, 184–185, 212
Israelo 35, 123–126, 200
Italio 7, 9, 10, 18–19, 21, 33, 76, 77, 171–173

J

Japanio 232
Jarry, A. 213
Johansson, S. 213

Ĵ

Ĵelev, V. 233

K

Kadar, A. 60–62, 157–163, 180–181

Kanado 12–15, 227
Keller, S. 75
KER-ekzamenoj 52–53
Kheirkhah, R. 36
Kongresa temo 188–189
Kongresoj, renkontiĝoj

Afrika Kongreso, 8-a 27–29, 30–33
Azia-Oceania Kongreso, 10-a 16–17
Esperantista Krea Renkontiĝo, 34-a 186
Esperantologia Konferenco, 45-a 111, 185
Germana Esperanto-Kongreso, 100-a 166
Hispana Kongreso, 81-a 256–257
ILEI-kongreso 56-a 10, 202–203
Internacia Fervojista Esperanto-kongreso 74-a 174–175
Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto 77
Internacia Junulara Kongreso 79-a 110–111, 173, 202–203
Internacia Vintra Universitato 38, 39, 44
Israela Kongreso, 23-a 123–126
Junulara Esperanto-Semajno 2022–2023 114–115
Komuna Seminario 40-a 51
Kongreso de Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo, 15-a 232–233
Krisolaj Esperanto-Tagoj 2023 166
Luminesk', 7-a 38–39, 40
Novjara Renkontiĝo, 19-a 38–39
Printempa Esperanto-Kunveno 155
Printempa Semajno

Internacia, 39-a 137
RenKEJtiĝo 82
Speciala Esperanto-ekskurso, 5-a 81, 112
UK, 107-a 12–15, 80
UK, 108-a 7, 9, 18–19, 33, 76, 106, 171–173, 177, 179, 180–181, 184–185, 189, 197
UK, 109-a 87, 182–183, 212, 248–249
Virtuala Kongreso 2022 34
Virtuala Kongreso 2023 209

Koreio 16–17, 36–37
Kóródy, Z. 54–55, 183
Kotizabelo de UEA por 2024 255
Koutny, I. 128–129, 130–131
Komar, H. 94
Kovář, L. 106
Kováts, K. 52–53, 210
Kovtonjuk, E. 235
Krause, E.-D. 261
Kroatio 36, 237
Kubisiowski, T. 147–149
Kubo 11, 68, 166
KuboF, H. 57, 138, 234

L

Landa agado 20, 21, 35, 36–37, 47, 54–55, 60–62, 70, 89, 112, 115, 116–117, 180–181, 183, 200, 204–205, 214, 232, 237, 247
Laslo, A. 37
Laste Aperis 19, 77, 127, 176, 206–207, 259
Laŭlum 108–109
Letero de leganto 46, 226–227, 254
Libroj

Belarta Rikolto 2023 260
Daŭripovo – Germana E-Kongreso Oldenburg 2022 166
Esperanta Kulturo 130–131
Esperanto por mi 150–151
Fluganta akrobato, la 226

Ĝambo Rafiki 199
IKU-libro 2023 142–143, 184–185
Malbela knabineto, la 178
Metropoliteno 203
Oriento-Okcidento, serio 42–43
Reĝo Ubuo 213

Li, Sh. 108–109
Lo Jacomo, F. 56, 63, 157–163
Loskutova, T. 208–209
Lowenstein, A. 118, 210

M

MacGill, S. 21, 151, 179
McClelland, M. 261
Maia, F. 157–163
Malagasio 37
Mamduhi, A. 78–79, 208–209
Manero, A. 211
Manirakiza, A.-P. 27–29, 180–181
Mantz, H. 54–55
Margot, N. 75
Matte, G. 180–181
Matúšov, M. 57, 138, 234
Maul, B. 22
Mbassa, M. 136, 173
Membraro de UEA 2022 95
Miyoshi E., 46
Modest, J. (Mihal-kov, G.) 41, 47, 226
Muhire, J. 249

N

Namutema, M.B. 32–33
Ndione, I. 30
Nepalo 82, 112
Nevelsteen, Y. 8, 174–175
Nicolas, Y. 23
Ni semas 119

O

Oficiala Informilo 21, 34, 69, 83, 103, 139,

156, 214, 237, 249
Omba, A. 65
Oneţ, I. 225
Opinio 70, 188–189, 254
Opulskienė, G. 124
Ó Riain, S. 231
Owen, T. 130–131

P

Pimenov, N. 208–209
Pineda i Traïd, E. 82
Pleadin, J. 20
Ploetner, H. 150–151
Pollando 6, 147–149
Popova, E. 41,
140–141, 150–151,
198, 233
Power, D. D. 186
Premio Degučī 197

R

Ralalarisoa, J. 191
Raveloharison, M. 31,
107, 197
Reale, Ĉ. 260
Recenzo 130–131,
213, 226
Resende, R. 226–227
Rete 8, 57, 99–101,
138, 234
Rezolucio de la 108-a
UK 172
Rogov, A. 131–132
Rue, M. 102–103

S

Sabiyumva, J. 157–163
Sartoro, Ro. 188–189
Schäffer, M. 157–163

Shrest, N. 81
Sekelj, T. 199
Serbio 37
So J. 16–17, 36–37, 157–163
Sonntag Ph., 70
Spezkonto 2022 164–165
Strategia Planado
64–65, 104–106,
133–136, 156
Striganova, A. 102–
103, 230–231

Ŝ

Ŝevčenko, D. 99–101

Š

Štimec, S. 36, 237

T

Tchikpe, P. 210
TEJO 110–111
Thorenz, M. 214
Tonkin, H. 56
Tuider, B. 243–244
Tur Garcia, A. 89, 139

U

UEA 3–6, 7, 27–29,
52–53, 56, 60–62,
64–65, 75, 104–106,
119, 133–136,
147–149, 156, 190–191,
195–196, 210–211,
223–224, 231, 243–
244, 245–246, 247
Ukrainio 79, 235

Unesko 63
Unuiĝintaj Nacioj 75

V

Varankin, V. 203
Vejdo 198
Viana P.S. 47, 115,
232–233
Vikipedio 138

W

Wandel, A. 5–6, 35,
38–39, 44–45,
66–67, 90–92, 123–
126, 142–143, 157–163,
184–185, 200, 212,
238–239, 258–259


Westerhoff, B. 93
Wunsch-Rolshoven,
L. 88

Y

Yu J. 108–109

Z

Zamenhof, L. L.
58–59, 152–154
Zamenhof-Tago
36–37
ZEOj 152–154, 227,
235
Zhao, W. 51
Zilvar, P. 54–55, 183



Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton
al akcepto en la Universala Kongreso.
La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi
al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe <https://uea.org/alighoj>

Fermo de la belga kaj sveda bankokontoj de UEA

Pro altiĝintaj bankokostoj kaj la pli kaj pli malofta uzo de tiuj ĉi kontoj la belga kaj sveda bankokontoj de UEA ne plu estos uzablaj ekde 1 januaro 2024. Anstataŭe oni pagu ekde nun al la ĉefa eŭra konto de UEA, IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64 (BIC: INGBNL2A).

Tiuj, kiuj havas sumon por pagi en kronoj (SEK), povas sendi la eŭran ekvivalenton (laŭ interbanka aŭ meza kurzo) al la supre menciita eŭra bankokonto aldonante sian UEA-kodon kaj la originan sumon en kronoj kiel priskribon de la pago. Oni povas uzi ankaŭ tiun ĉi interretan pagformularon por pago rekte en kronoj: mallonge.net/15k

Regulaj uzantoj de la belga kaj sveda bankokontoj de UEA ricevis intertempe retmesaĝon kun pliaj informoj.





4-a Virtuala Kongreso de Esperanto

23-a ĝis 26-a de novembro 2023

Ĉefa virtuala Esperanta aranĝo de la jaro

Programo:

<https://vk.esperanto.net/2023/programo>

Migrantan Hirundon, kurieron de la 4-a VK, legu senpage ĉe

<https://revuoesperanto.org>



**Sekvu kaj abonu
la Gazetarajn
Komunikojn de UEA
por informiĝi pri
freŝaj novaĵoj ĉe:**

**[https://uea.org/
aktuale/komunikoj](https://uea.org/aktuale/komunikoj)**